MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

5

MAJO 2019 Kol. 409/35

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Vojaĝanto, Pri la forpaso de Gaby, Invitoj : de s-ro Acher, de la Klubo Amikeco Č. Třebová, al renkontiĝo en Pardubice, Novaĵoj el la redakcio, El agado de E-mental´- klubo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Vojaĝi tra la mondo helpe de lambastonoj

En brazila revuo mi legis tekston pri brazila viro, kiu bezonante piediri per la helpo de lambastonoj, jam vojaĝis al 130 landoj. Sendube li povus rakonti pri multaj okazintaĵoj, sed tre verŝajne la revuo ne volis dediĉi pli ol unu paĝon al lia rakonto. Mi tradukis kaj iomete mallongigis tiun rakonton. "Mia vivo ŝanĝiĝis en 2003. Mi maltrafis buson kaj prenis taksion. La ŝoforo stirinta la taksion telefonis kaj koliziis kun kamiono. Mia dekstra kruro iĝis kvazaŭ muelita. Mi perceptis, ke post la kolizio, kiam mi estis malfortega kaj perdis sangon, iu ŝtelis mian monujon. En la hospitalo, okazis alia katastrofo. Por kunigi la frakasitajn ostojn,

la kuracisto uzis materialon, kiu kaŭzis infekton. Pro tio mi povis forlasi la hospitalon nur tridek tagojn poste.
Mi uzis aparaton nomatan Ilizarov, specon de ekstera kaĝo uzata ĉe la traktado de malfermaj frakturoj. Ĝi estis fiksita al mia osto ĉe dek ok lokoj. Mi restis kun tiu kaĝo dum du jaroj kaj ok monatoj. Dufoje la kuracistoj sugestis amputadon de la kruro, sed mi ne akceptis tion.

La konvalesko estis longa. Estis faritaj 43 operacioj por forigi la bakteriojn el la ostoj kaj en ĉiuj el ili mi ricevis ĝeneralan anestezon. Mi prenis tiom da medikamentoj, ke mia stomako iritiĝis. Kiam la aparato fine estis forigita, mi devis relerni piediri. Mi ne sentis min sekura eĉ por transiri straton.

Post longa tempo en lito kaj en rulseĝoj, mi nun trafikas per lambastonoj. Helpe de ili, mi plenumas mian promeson vojaĝi tra la tuta mondo, se mi iam denove kapablos piediri.

La vojaĝoj komenciĝis en 2009, kiam mi vizitis mian filon, kiu studis en Irlando, kaj mi decidis vojaĝi al ses aliaj landoj en Eŭropo. Tiu komenco estis tre malfacila. En la flughaveno de Parizo neĝis kaj ne estis pasaĝera ponto, do mi devis piediri sur glacio.

Hodiaŭ, 60 jara, mi fieras diri, ke mi vizitis 130 landojn. Pasintan semajnon en la flughaveno de São Luis (Brazilo), de kie mi ĉiam komencas miajn vojaĝojn, estis metita tabulo por honori min. Tamen mi estas nur meze de la vojaĝoj. Mi volas viziti ĉiujn 194 landojn rekonitajn de UN.

Kaptis min la aventuremo. Ene de unu jaro, mi iris al ambaŭ ekstremoj de nia planedo: Ushuaia, en Argentino, kaj Barrow, en la nordo de Alasko.
En Kamboĝo, vidante ke la ŝtuparo de templo estas tre kruta por ke mi malsupreniru piede, mi malkovris, ke mia scivolemo estas pli granda ol mia timo: mi malsuprenglitis sur mia pugo. La mondo konspiras al favoro de tiuj, kiuj ŝatas vojaĝi.

Unufoje mi estis ellandigita el Bangladeŝo. Mi estis ricevinta la informon, ke oni povas ricevi la turistan vizon, kiam oni alvenas en la flughavenon, sed estis okazinta regulŝanĝo. Do mi devis tuj forflugi el Bangladeŝo.
En Libano, post ĵusa malkovro kaj konfisko de drogoj alportitaj de brazilano, oni testis min: mi devis trinki tri grandajn glasojn da akvo. Mi klarigu: tiuj, kiuj alportas kokainon en sia stomako, ne sukcesas engluti multe da likvaĵo.

Mi havas pasion por Azio. Mi estis en Srilanko, Laoso, Nepalo, Vjetnamio. La homoj tie estas feliĉaj kaj ĝentilaj. Mi ĝojas scii, ke mi ne estas la sola mondvojaĝanto en specialaj kondiĉoj. Mi iam amikiĝis kun blindulo, kiu vojaĝis tra la tuta Eŭropo akompanate de sia gvidhundo.

Ĉiam mi petas rulseĝon en la flughavenoj, ĉar rulante sur ĝi mi povas pasi tra la enmigrad-kontrolejo pli rapide, en speciala vico.
Mi ne konsterniĝas, kiam miaj pakaĵoj perdiĝas – tio okazis kelkajn fojojn. Mi povas atesti, ke iam la vestoj reaperas.

En miaj vojaĝoj, mi aĉetas malmulte, sed mi ĉiam alportas kafon. Hejme mi akceptas geamikojn por kune gustumi la plej diversajn tipojn. Ĉu vi scias, kial mi amas kafon? Ĉar tio, kio plej gravas al mi, estas homoj kaj ĉirkaŭ tablo kun kafo oni

kuniĝas por paroli kaj interŝanĝi impresojn. Miaj lambastonoj kaj mi havus multon por rakonti“.

Tiun ĉi artikolon skribis Herbert A. Welker el Brazilo

Pri la forpaso de Gaby

La sesan de aprilo 2019 nokte forpasis Gaby Tréanton. Fidela SAT-anino ekde 1947, ŝi ĝis antaŭ ne longe plu pasie varbis por Esperanto, forlasante la maljunulejon por informi infanojn en la plej proksima lernejo. Certe multaj memoras, ke ni festis ŝian 90-jariĝon dum la SAT-amikara kongreso en Hiliono en la jaro 2010.

Jen ĉi-sube la mesaĝo de Maja Meriaux, kiu petis min transdoni la informon al la listo:

"Kun granda aflikto mi anoncas al vi la morton de Gaby, en ŝia 99-a jaro.

Ŝi forpasis en sia ĉambro de la maljunulejo de Tregastel. Ekde kelkaj monatoj, ŝi ne sufiĉe manĝis, pro problemoj en la ezofago. Plie, ŝi suferis de multaj rompiĝoj de ostoj, la lastaj ne plu operacieblaj.

Ŝi serene adiaŭis nian mondon. Ŝia entombigo okazis la 10-an de aprilo, en du partoj:
religia ceremonio 13,30h en la preĝejo de St-Quay-Perros,
civila ceremonio 15,30h en la kremaciejo de Bégard.
La impona kontribuado de Gaby por la Esperanta movado longtempe restos en niaj memoroj."

Kara, mirinda, ĉarma Gaby, neforgesebla, vi restos plu vivonta en niaj koroj. Marie-Thérèse Lloancy
kaj membroj de EK + AEH klubanoj, Pardubice, Ĉeĥio,
ankaŭ: https://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=15

Gaby longe vivis, kiel mi surprize konstatis ĉe SAT kaj UEA, kaj ŝi multe agis profite al Esperanto. Ankaŭ mi pro tio multe aprezis ŝin. Ŝi ĉiam estis agrabla, aktiva.

Mi unuan fojon renkontis ŝin dum semajnoj de Plouezeko-renkontiĝoj en Bretonio, kie mi, de la komenco, partoprenis dum pluraj jaroj, kun mia edzo. Gaby zorgis pri infanoj, inter ili estis niaj tri genepoj. Mi konservos pri ŝi varman memoron.

Teresa

I n v i t o j

1) Al nia amiko – s-ano Miroslav Malovec – redaktoro de Starto telefonis s-ro Ivan Acher, ke la 23-an de majo je la 19-a horo estos en la Galerio-turo en Frýdek-Místek koncerto kun arioj el la opero Sternenhoch.

Li invitis s-anon Malovec por prezenti prelegon pri Esperanto kaj volis, ke ili renkontiĝu post la jarfino, kaj ke li invitu ankaŭ pluajn esperantistojn. En la sama loko s-ro Acher koncertis jam dum aŭtuno kaj laŭdire estas tie loko por cent homoj. Do, venu ĉiu, kiu pri tio interesiĝas.

Miroslav Malovec

2) Esperanto-klubo „Amikeco“ en Česká Třebová organizas okaze de la 10-a fondodatreveno de la Klubo de fervojista E-asocio renkontiĝon (ČŽES) sabate la 1-an de junio 2019 en la urbo Česká Třebová.

Programo:
10,30 trarigardo de produktejoj de la entrepreno CZ LOKO. La organizaĵo solenas nunjare la 170-an datrevenon de originaj fervojistaj laborejoj.
Je la 12,00 komuna foto ĉe la memorŝtono okaze de la 50-a fondodatreveno de EK ČT en la parko Javorka; je la 13,00 restado en la restoracio Javorka kun mallonga programo: 10 jarojn de ĈFEA kaj pri la IFEF-kongreso en Malaga. Mendu la tagmanĝon kaj refreŝiĝaĵon (restoracio preparas krad-rostilajn manĝojn).Venu je la 10,10 h. antaŭ la stacidomon en Česká Třebová. (alveno de Prago 9,50 h., de Olomouc 10,04 h., de Brno 9,38 h.).

Ni petas konfirmon pri Via ĉeesto plej malfrue ĝis 28.5.2019 al telefono 602483265 aŭ retpoŝto: kovar.lad@email.cz

3) Klubo de esperantistoj de doktoro Schulhof kune kun AEH preparas renkontiĝon okaze de la centjara datreveno de la forpaso de ĝia fondinto. Samtempe la klubo festas la 110-an fond-datrevenon de Esperanto en Pardubice.

Alvenu rememori la eminentan esperantiston kaj poeton dimanĉe la 22-an de septembro 2019 de la 10-a horo en kafejo Royal proksime de la urba tombejo. Komune ni tagmanĝos, vizitos la judan tombejon, ni aŭskultos kelkajn prelegojn (P.Chrdle, ktp.) kaj iomete da poemoj de dr-o Schulhof kaj babilos. Nia kolektivo ĝojatendos vin.

Novaĵoj el la redakcio:

Ni aĉetis por AEH novan kopio-aparaton kaj ni esperas, ke la eldonado de la monat-gazeto Informilo estos pli simpla, ĉar la solvado de difektoj en la malnova kopiilo postulis jam multe da strebado kaj mono.

Okaze de la fond-datreveno de la E-klubo d-ro Schulhof ni preparas libron en kunlaboro kun la Regiona biblioteko en Pardubice. Ni esperu, ke dum la septembra renkontiĝo ni povos ĝin prezenti al vi. Rekompence ni helpos organizi ekskurson de polaj bibliotekistoj en la loka biblioteko por interŝanĝo de spertoj. La tuta traktado okazos en Esperanto kun traduko al la pola kaj ĉeĥa lingvoj, por ke la polaj bibliotekistoj havu eblon ekkoni la aplikadon de Esperanto en la profesia vivo. Ili vizitos du bibliotekojn, la monton de Kunětice kun burgo (ĉeĥe Kunětická hora) kaj kastelon kun ĉevalejo en la urbo Kladruby nad Labem. red.

El la agado de E-mental´ klubo:

En februaro okazis la tradicia kaj tre ŝatata vizito de ZOO en la ĉeesto de 30 partoprenantoj, komence de marto estis turniro en tablo-teniso, poste ekskurso de 15 anoj al Leipzig laŭ la invito de germanaj gejunuloj; en aprilo okazis jam la 15-a BIERo, ĝi estis en Chotěboř kun 19

personoj, el tio 10 eksterlandanoj. La 1. 5. 2019 okazis la tradicia „kiso sub ekflorinta ĉeriz-arbo“ en Dominikální Paseky.

En junio ni renkontiĝos en Chotýčany ĉe la urbo České Budějovice por komuna kradrostado, en julio semajna „Ĝuu Pragon“ por konatiĝo de eksterlandanoj kun Prago, kaj okazos ankaŭ granda geedziĝceremonio de du E-mentalanoj. En oktobro flugos granda grupo de membroj al Sicilio.

L. Angelová

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.